

SESA RENDEVUO DIDAKTIKA:
Tuja intimiĝo kun la beletra literaturo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 februaro 27 & 29

Cl.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al sesa rendezuo didaktika kun gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

A.- Vi ne ŝatas mem verki la tekstojn, kiujn vi submetas al viaj gelernantoj por la lingvo-studado. Ĉu pro modesteco?

Cl.- Eble jes! Por la komencantoj mi verkis kelkajn gradigitajn tekstojn, sed mi ne multe kredas je tiuj rakontoj kaj skeĉoj. Malmultas la aŭtoroj reale kapablaj verki por esperanto-komencantoj. Esceptas en la esperanto-literaturo kelkaj verkoj indaj je atento, inter kiuj mi listigas ĉefe la romanetojn **Karlo** de Edmond Privat kaj **La Verda Koro** de Julio Baghy. Ili konservis freŝecon kaj stile estas studindaj ne nur de komencantoj. Sed la uzo en kursoj de tiuj romanetoj, nun iom eksaj, same kiel de la krimrakonto **Gerda malaperis** de Claude Piron kaj de similaj modernaĵoj, vekas en mi senton de nekontenteco, kiun mi baldaŭ malkovras ankaŭ ĉe la lernantoj. Multajn horojn oni dediĉas al mezinteresaj verkoj stile monotonaj, kiuj ne kondukas al reala matura lingvaĵo.

A.- Vi opinias, ke veran lingvaĵon oni lernas pere de trastudo de aŭtentaj dokumentoj, eĉ se ties aliro ne ĉiam estas facila.

Cl.- Tute prave. Post venko de kelkaj kompleksaĵoj oni intimiĝas kun reala beletraĵo, al kiu oni emos reveni, por fari novajn malkovrojn stilajn kaj enhavajn. Tion ne povas proponi la literaturo por komencantoj.

A.- Vi do malkonsilas la aĉeton de **Gerda malaperis** kaj de aliaj porkomencantaj pironaĵoj.

Cl.- Tute ne! La komencantojn mi direktas al facilaj legaĵoj, inter kiuj troviĝas **Gerda malaperis**, **Lasu min paroli plu!** kaj **Ili kaptis Elzan!** de Claude Piron, **Faktoj kaj Fantazioj** de Marjorie Boulton kaj **Kumeŭaŭa, la filo de ĝangalo** de Tibor Sekelj. Aron da tiaj libroj mi ĉiam konsilis al miaj kursanoj. Sed en la kurso mem por komencantoj aŭ progresantoj mi ŝatas malkovrigi aliajn verkojn pli kompleksajn, kiuj invitas al relego aŭ al plua studado de beletraĵoj. Por fari komparon kun alia instru-situacio, ni rigardu al franclingvaj infanoj dekjaraj, kiuj lertiĝas en la legoarto propralingva. La instruistoj kondukas ilin al biblioteko por junuloj, kie ili povos elprunti librojn enhave kaj vortare adaptitajn al siaj aĝo, konoj kaj intereso. En la lego-lecionoj kaj en la tempo dediĉita al lego-taskoj ili ricevu tempon por vori tiun literaturon kaj por raporti al la kamaradoj pri la legitaĵoj kaj pri siaj ŝatoj kaj malŝatoj. Sed aliaj lecionoj malkovrigu al tiuj infanoj verajn beletraĵojn, kiel la prozan poemon "La Eta Princo" de Saint-Exupéry, kiel erojn el la teatraĵo Knock de Jules Romain kaj el komedioj de Molière, kiel fablojn de La Fontaine, kiel novelon de Guy de Maupassant, ktp. Komuna trastudo de tiaj verkoj, se ĝi estas inteligente gvidata, kapabligas distingi beletraĵojn, al kiuj oni revenos, de la tempopasigaj verkoj, kiujn oni malofte relegas.

A.- Vi opinias, ke esperanto-instruanto ankaŭ havas la taskon malkovrigi realajn beletraĵojn al siaj gelernantoj.

Cl.- Jes, kaj tio ekde la unua leciono. Multaj poemoj el **Ezopa Saĝo** de Kálmán Kalocsay estas alirablaj ekde la unuaj esperanto-lecionoj. Tralego de novelo el **Vole Novele** de Raymond Schwartz aŭ el **Bakŝiŝ** de Leonard Newell malkovrigas, ke esperanto ankaŭ povas fieri pro sia novelarto. Gvidata legado de fragmentoj bone elektitaj de verkoj el diversaj genroj instigos plurajn kunstudintojn al akiro kaj tralego de la **Eseoj** de Gaston Waringhien, de la **Kongresaj paroladoj** de Ludoviko Zamenhof, de la romano **Kiel Akvo de 1' Rivero** de Raymond Schwartz, de **Vagado sub Palmoj** kaj **Mastro M'Saŭd** de Jean Ribillard, de **Historio de Esperanto, Vivo de Zamenhof** kaj eĉ **Interpopola Konduto** de Edmond Privat, de **Maŝinmondo** kaj **Vojaĝo al Kazohinio** de Sándor Szathmári, kaj tiel plu..

A.- La instruado al komencantoj devas instigi al plua studo de la lingvo kaj al intimiĝo kun ties beletra literaturo.

Cl.- Mi diru pli. Al ekkonscio, ke tiu originala literaturo ekzistas kaj ke nur tra ties malkovro, oni reale konas la realan dimension de esperanto. Kiam mi legas statistikojn pri la plej multkvante venditaj libroj, mi ĉiam hontas. Ne verkoj por komencantoj devus okupi ĉeflokon. Se la esperantistoj, post la eklerna periodo, plue legus, niaj klasikaĵoj ne restus elĉerpitaj aŭ preskaŭ neaĉeteblaj. Mi scias, ke dum mia pli ol dudekjara periodo de instruado de esperanto kadre de la aktivecoj de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, mi instigis multajn reale ekŝati esperanton kaj intimiĝi kun ties aŭtoroj. La libro-servo de KCE pro tio fariĝis unu el la lokoj en la mondo, kie vendiĝis ne nur porkomencanta literaturo kaj varbiĝis abonantoj al la revuo "Literatura Foiro" kaj al aliaj kulkulturaj organoj.

A.- Estas tutcerte fakto, ke en la medio de beletremuloj maturiĝas la fortoj, kiuj vigligos la esperanto-movadon: tie formiĝas tradukistoj, redaktoroj, kursgvidantoj, prelegantoj kaj kial ne, verkistoj.

Cl.- Instruado, kiu neglektas la intimiĝon kun la veraj valoroj malfavoras la evoluon de tiuj valoroj.

A.- Ĉu vi opinias, ke la esperanto-instruado estas neglektata al la kulturo de la valoroj, kiuj kaŝiĝas en la esperanto-literaturo?

Cl.- Jes, pli ol ni imagas. En multaj grupoj la instru-nivelo kondukas al stagna situacio, kaj en tiuj lokoj la elito ofte kreiĝas ekster la klubeja medio. Mi evitos doni precizajn ekzemplojn por ne ofendi samideanojn, sed mi timas, ke manko de klereco ĉe multaj kursgvidantoj malebligas alies kleriĝon. Kie la supro de la poezia kono restas la poemoj de Zamenhof, tie oni ne antaŭvidu zamenhofan feston kun io alia ol bankedo, lumbildoj kaj adasismaj versaĵoj.

A.- Ĉu la kunstudado de altnivela revuo ne povus helpi tiujn rondojn?

Cl.- Jes, certe ! Nuntempe "Literatura Foiro", "Iltisa Forumo" kaj "Fonto" estas revuoj, kiuj ludas ege pozitivan rolon klerigan, kaj estas grave, ke el pluraj eldonejoj proponiĝu novaj libroj. Ĉefrolon plenumas hodiaŭ la italia Edistudio, la brazila Fonto, la sarlanda Iltis kaj la svislanda LF-Koop. La novaj esperantistoj devus tuj konatiĝi kun la produktoj de tiuj dinamismaj eldonejoj.

A.- Kaj kio pri revuoj kiel "Monato" kaj "Heroldo de Esperanto"?

Cl.- Ankaŭ ili estas tre gravaj. "Heroldo de Esperanto", la revuo "Esperanto" de UEA, "Sennaciulo" kaj "Monato" tutcerte ludas tre gravan rolon pro sia internacieco kaj pro la varieco de siaj priokupoj. Ankaŭ ĉiu havas sian publikon, kiu bedaŭrinde tendencas al unuflankeco.

A.- Ĉiuj menciitaj eldonejoj, kun la escepto de "Fonto", troviĝas en Eŭropo. Ni ofte parolas pri la tutmondiĝo de esperanto, sed ni devas konstati, ke malfacile la zamenhofa lingvo forlasas sian naskiĝo-kontinenton.

Cl.- Antaŭ kelkaj jaroj el Japanio la revuo kaj eldonejo "L'Omnibuso" kontribuis al la tutmondiĝo de la esperanto-literaturo. Nun "Ludovikito" kontribuas al la fortikigo de la esperantologiaj kaj prizamenhofaj esploroj, sed mi havas la impreson, ke maljuniĝis la esperanto-socio en multaj landoj, kiuj konis kuraĝigan dinamismon. Povas esti, ke la foresto el la eŭropa multlingveco malfavoras la formiĝon de nova esperanto-generacio en Japanio kaj Brazilo. La manko de kulturaj centroj malhelpis la formiĝon de nova publiko. Kaj en Ĉinio la rigidiĝo de la komunisma diktaturo ne estas reale favora al la disfloro de nia lingvo. En la aliaj aziaj landoj malriĉeco kaj troaj distancoj estas malhelpo al kleriĝo. Kaj la mizero nun reganta en orienta Eŭropo bremsas la eldonajn kaj kulturajn aktivecojn. Tamen mi estas certa, ke Orienteŭropo estas nuntempe promesplena. Povu la eldonejoj kaj revuoj, kiuj nun aperas en Okcidenteŭropo apogi tiun dinamismon kaj ne timi la konkurencon de entreprenoj, kiuj provas ekstarti en Pollando kaj en aliaj ekskomunismaj landoj.

A.- Kaj povu ankaŭ en Okcidenta Eŭropo leviĝi nova generacio. Ni baldaŭ estos emeritoj kaj esperas, ke nova fortoj kapablos ekzemple transpreni la torĉon en la gvidado de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND diras: Ĝis la reaŭdo!